

granda urbo en *Warwickshire*, Anglujo. Ĝiajn regulojn oni difinis, kiam fondiĝis la „*English Rugby Union*” en Londono en la jaro 1871, kaj la ludo fariĝis populara krom la internacie pli konata kaj pli malnova speco „*Association football*” ne nur en Britujo, sed ankaŭ en la Britaj kolonioj. En la jaro 1875 oni enkondukis ĝin tra Kanado en Usonon. Tie oni iom modifis la regulojn, kaj ĝi fariĝis treege populara; ĝi estas ankaŭ enkondukita en Argentinon. Sed ĝi ne estas usona nek „amerika pilkludo”.

T. L. C. Bluett.

### Scienca kaj Teknika Terminaro (STT).

Dum la lastaj sep jaroj efektiviĝis ampleksa scienca kaj teknika terminaro, verkita de dipl. inĝ. R. Haferkorn kaj kem. d-ro K. Dellian, kaj kontrolita de prof. d-ro F. J. Belinfante. Ĝi estas aranĝita laŭ la modedo de Plena Vortaro kaj povas servi kiel faka aldonajo. La enhavo estas laŭalfabeta, Esperanta termino kun difino en Esperanto kaj, kie necesas, kun traduko en la lingvoj germana, angla kaj franca, ofte kun la indico de la Universala Dekuma Klasado.

La terminaro enhavas ĉ. 5100 terminojn kaj aperos bindita en presita formo. Por aperigi la verkon antaŭmendoj estas bezonataj. La prezo estas por antaŭmendantoj 3 dolarojn.

Direktu vian mendon al dipl. inĝ. R. Haferkorn, (13b) *Berchtesgaden*, Königsseer Str. 50/o, GERMANUJO.

ENHAVO:	paĝo
Neoficialaj vortoj en nia lingvo. — D. R. Broadribb .....	81
Ĉu oni povas vidi la atomojn? — H. Sirk .....	91
Internacia scienca servo. — M. Wajsblum .....	103
La studo de la birdomigrado en Nederlando. — G. F. Makkink .....	108
Recenzoj kaj Bibliografio .....	114
Pasko (Martinus). — G. Hamming .....	114
Determinado de la plej ĝeneralaj planaj paraanalitikaj funkcioj (M. Fréchet). — W. P. R. ....	116
Otoci kamenara (M. Gjivoje). — G. F. M. ....	116
I Dizionari Tecnici (P. Marelli). — G. F. M. ....	117
Japanaj verkaĵoj el Anatomia Instituto de la medicina fako de Nihon Universitato, Tokyo. — G. F. M. ....	117
Raportoj de la Ŝtataj Hortikulturaj Esploroj en Alnarp, Svedujo. — G. F. M. ....	118
Diversaĵoj .....	119
Enketo pri Esperanto en sciencaj kaj fakaj gazetoj neesperantistaj. W. P. Roelofs .....	119
Partoprenu radio-elsendojn de Radio Roma .....	119
Aldonajo al la artikolo de prof. d-ro N. R. Dhar .....	119
Korekto. — T. L. C. Bluett .....	119
Scienca kaj teknika terminaro (STT). — R. Haferkorn .....	120
ISAE-informoj. — S. Alexandersson .....	107

### Informoj kaj gvidlinioj por verkontoj.

Scienca Revuo akceptas diversspecajn artikolojn; ili povas, ekzemple, havi instruajn, superrigardajn kaj/aŭ ordigajn karakteron kaj stilon; ili ankaŭ povas trakti ian specialan temon. La artikoloj tamen prefere ne estu tro specialismaj; la verkanto almenaŭ kredu, ke la artikolo estos utila aŭ interesa por ĉiaj scienculoj.

La aŭtoroj aparte atentu pri siaj terminoj. Ili konsideru ke la terminoj estu elegantaj, kaj elektendaj laŭ la principo de sufiĉo kaj neceso. Oni do evitu nenecesajn radikojn, eĉ se tiuj jam ekzistas.

La redakcio prenas la rajton se necese iomete aliigi la frazojn kaj terminojn, se la verkinto tion ne aparte malpermesis. Terminoj ne trovablaj en Plena Vortaro estu klare difinataj, escepte se ili estas sufiĉe ĝenerale konataj al ĉiufakaj scienculoj aŭ vere internaciaj laŭ sia formo. La difinon oni povas doni per piednoto aŭ en aparta artikoleto; ofte sufiĉas mencio de literaturoloko.

Oni ne nepre evitu la literon ĥ. Ĝi estas plenrajta apartenaĵo de nia lingvo. kaj aparte en fakaj terminoj ofte povos ludi utilan rolon.

La artikoloj ktp., se eble, estu tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun unulinia interspaco inter la linioj kaj kun malplena marĝeno maldekstre. Ĉiu litero de manuskripto estu klare legebla; oni memoru ke la kompostistoj ne estas esperantistoj.

Figuroj kaj aliaj kliŝotaj estu faritaj per nigra inko, sufiĉe grandaj kaj klaraj. Fotoj estu brilaj, nigro-sur-blankaj.

Oni povas indiki literaturon por pruvo aŭ por plia informo. Tamen oni ne troigu. Menciataj literaturaĵoj estu indikitaj per la nomo de la aŭtoro(j); en kazo de gazeto oni aldonu ties nomon kun volumnumero, jaro de apero, kaj paĝo; en kazo de libro oni aldonu ties titolon, adreson de la eldoninto, kaj jaron de apero.

Aŭtornomojn oni skribu per minuskloj, sed eventuale oni substreku per intermita linio (streketaro); kursivigendaĵojn oni substreku aŭ per serpentuma linio aŭ per ruĝa krajono. Por indiki pezan litertipon oni substreku per ordinara nigra linio. Oni retenu kopion por faciligi eventualan prian korespondon.

Aŭtoroj ne ricevas honorarion, sed se ili deziras, ili povas ricevi senpage maksimume 20 ekzemplerojn de la kajero en kiu ilia artikolo aperis. Pliaj ekzempleroj estas liverblaj kontraŭ pago de poe 0.25 ned. guldeno por unuobla kaj 0.40 ned. guldeno por duobla numero. En kazo de iom granda mendo represio de unuopa artikolo povas esti konsiderata. Oni nepre ĝustatempe sciigu la redakcion pri la dezirata nombro, prefere per noto sur la manuskripto ĉe la kapo de la unua paĝo.